

kontakto

tutmonda
esperantista
junulara
organizo

n-ro 3
somero 1964

kontakto

Organo de Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo
(Junulara Sekcio de UEA)

n-ro 3

somero 1964

Prezo: individua numero - 2,20 ned. gld.
(9 steloj)

Jarabono (minimume kvar numeroj) -
8 ned. gld. (32 steloj)

Redaktoro: Humphrey Tonkin,
7 Linnaean Street, Cambridge 38,
Mass., Usono

Teknika redaktoro: Adriaan den Haan

Reklama Redaktoro: James May

Desegnisto: Jan Schaap

Administrantino: Elly Wijnands

Administrejo, al kiu oni sendu ĉiujn
abonkotizojn, reklamojn ktp.:
Kontakto, Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-2, Nederlando

Bankisto de UEA: R. Mees & Zoonen,
Blaak 10, Rotterdam-1

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v.,
Nieuwe Binnenweg 460, 462,
Rotterdam-6, tel. (010) 5 66 45

Reklamtarifo: La redakcio liveros kon-
traŭ peto. Ekzistas speciala malalta
tarifo por esperantistaj entreprenoj.

Manuskriptojn por Kontakto oni sendu
al la redaktoro en du ekzempleroj.
Ili devas esti klare tajpitaj en
korekta Esperanto, kaj ĉiuj supersignoj
devas aperi laŭ ĝusta formo, se necese
enskribitaj permane. Oni skribu sur
unu flanko de la papero kun interlinia
spaco kaj kun granda maldekstra mar-
ĝeno. Sendu materialon aerpoŝte. Ĉe
leteroj destinitaj al aperigo oni sekvu
la samajn instrukciojn.

La redaktoro aparte bonvenigas arti-
kolojn originalajn aŭ tradukitajn pri
temoj sociologiaj, kulturaj, sportaj kaj
vojaĝaj. Li ankaŭ daŭre bezonas fotojn,
kun aŭ sen artikoloj. Ĉiu materialo
havu iun apartan intereson por la ju-

nularo kaj artikoloj prefere estu ver-
kitaj de gejunuloj mem.

La redakcio de Kontakto ne akceptas
respondecon por la opinioj esprimitaj
en subskribitaj artikoloj, kiuj ne
necese akordiĝas kun la opinioj aŭ
principoj de TEJO. Por la enhavo de
la artikoloj respondecas nur la sub-
skribintoj mem.

Krome, la redakcio rezervas al si la
rajton mallongigi aŭ alimaniere adapti
subskribitajn artikolojn laŭ sia bon-
trovo.

La **fondaĵo junulara gazeto** estas
oficiala fondaĵo de UEA kaj ĝia celo
estas subteni la gazeton de TEJO dum
ĉi tiu frua periodo de ĝia eldonado.
Kontribuaĵojn oni faru rekte al UEA
aŭ ties perantoj, al landaj sekcioj aŭ
al estraranoj de TEJO.

ENHAVO

- Taekeng Kim: Junulo
kaj idealo 1
- Ĉu sesa senso? 3
- József Kopré: Knabo kun
pakaĵo 7
- Kerstin Sällvin: Tipa
sveda festo 11
- Hans Bakker: Amsterdam 13
- Jan Schaap: Internaciaj .
aspektoj de la manskribo 15

Pro premo de materialo ni
prokrastis aperigon de nia arti-
kolo pri la Novjorka Monda
Foiro ĝis la aŭtuna numero.

Junulo kaj idealo

Al la junulo plej grava estas la
fakto ke juna, kaj simple ĉar juna,
la junulo ricevas admiron de aliaj
homoj. La freŝa forto kaj esperplena
koro — tio estas la simbolo
de la junulo. Sed pli grava lia
propraĵo estas la juna animo sen
laceco kaj sen enuo. La animo
ankoraŭ ne scias, kion signifas
malvenko, kaj de kie venas ofendo.
Tial, antaŭ minaco ĝi ne konas
sinsubigon, kaj en la ordinara vivo
ĝi rifuzas kompromison je
malbono kaj maljusto: ĝi ne scias
serĉi la mezan vojon turnante sin
dekstren kaj maldekstren.
La junulo agas nur laŭ sia penso,
parolas nur laŭ sia vido, kaj kredas
nur laŭ sia ideo. Vere fiera generacio!
Ĉar al la junulo estas ankoraŭ longa
longa mateno antaŭ la noktiĝo
de la tago de la vivo.

Jes, al la junulo estas ankoraŭ mateno,
la longa mateno, kaj ankaŭ la
tagmezo, vespero kaj nokto de la vivo.
Tial, eĉ se la junulo foje misiras
vojon, li reveninte povas serĉi
novan vojon. Post tio, ankoraŭ la
suno ne estas transirinta pli ol
ĉielmezon. Do, la junulo ne
estas trankvila kaj neurgema kiel
la maljunulo en la vespero de la vivo.
Tial juste kaj senpartie juĝante
bonan kaj malbonan, veran kaj
malveran, la junulo povas laŭte diri
siajn vortojn sen konsidero de
la mienoj de iuj ajn.
Tiele la junulo povas fariĝi la
severa juĝanto de la nuna historio,
kaj samtempe la atestanto de la
aktualo.

La grandioza forto de la
junulo estas ĝuste tio, ke li havas
morgaŭojn, multajn morgaŭojn.
Kompreneble la morgaŭo estas ne
konata. Neniu povas scii sian
estontecon.

Kaj en nescio la morgaŭo povas esti
jen luma jen malluma,
jen ĝoja jen malĝoja, jen feliĉa jen
malfeliĉa. Tie troviĝas la ĉarmeco de
la morgaŭo.
Dank' al tio, junulo povas ŝanĝi la
malfeliĉan nunon en feliĉan estonton,
kaj anstataŭigi la nunan mankon
per morgaŭa abundo.
Tiel, junulo ne estas devigata
ĉagreni kaj malesperi pri nuna sia
sengrasa portreto, kaj eĉ nuna
feliĉulo povas strebi al plia feliĉo en
la estonteco. Sekve, la morgaŭo,
vokante la junulon antaŭen,
freŝigas lian sangon, batigas lian koron
kaj etendas ĝislime liajn flugilojn
de la kreado sub la senlima
blua ĉielo.
Tial pleje necesas al la junulo
ĝuste tiu morgaŭo.

Sed abundon tre facile sekvas trouzo:
la junulo povas eluzi la
morgaŭon. Ĉar la morgaŭo ne
estas senlima kaj senfina. Tempo mem
estas senlima kaj eterna,
sed la tempo por ĉi tiu junulo
aŭ tiu plenaĝulo estas limiga kaj
limigita.
Iam, iel, antaŭ ĉies okuloj la tempo
ŝajnas eterna.
Same ŝajnas eternaj gloro kaj
prospero.
Sed tio estas erara.
Tiuj kiuj estas nun en gloro, feliĉo kaj
prospero finfine falos en mizeron.
Jam estos malfrue, kiam ili
sperte konscios la fakton.
Do, la junulo devas klare kompreni
ke li mem vivas formangante tiujn
morgaŭojn tagon post tago.
La tempo tre rapide forpasas, pli
rapide ol la junulo kredas.
Se li ne kaptas ĝuste hodiaŭon, li tuj
renkontas tro multajn hieraŭojn.
Por la junulo la problemo estas do,
ne kion li faros morgaŭ, sed kion
li faras nun.

La junulo devas alkuri antaŭen.
Al la horizonto de la estonteco!
Sed al kio li kuru?
Ĉu al la multaj steloj sennombre
briletantaj super la horizonto? Ne!
Estos unu stelo precipe hela el
la multaj steloj.
Estos unu stelo, distingante sin de
aliaj, kiu ĵetadas varmetan rideton
al la junulo mem.
La junulo devas serĉi tiun stelon,
kiu donas la vojon al li en la malluma

nokto kaj en la terura ŝtormo,
kaj ankaŭ kondukas lin svingantan laŭ
la vojo.
Ĝuste tio estas la idealo de la junulo.

La idealo lumigas la vojon de la
junulo, kaj ankaŭ forigas
maldiligentecon kaj enuon.
Ĝi donas al la junulo kreopovon,
saĝon kaj kuraĝon.
La idealo ankaŭ igas al la junulo
sincere pensi kaj mediti,
kaj zorgeme serĉi direkton de la agado.
Per tio la junulo mem konscias la
signifon de sia vivo,
kaj pro tio la junulo denove surprizas
la belecon de la vivo.
Tiam la junulo bone konscias,
por kio estas liaj talento,
beleco, pasio kaj freŝa energio, kaj kiel
li bezonas ilin.
La junulo sentas sian valoron kaj
sian signifon.
Tiu momento fariĝas tagiĝo
de la vivo.
De tiam la historio de la vivo
komenciĝas; de tiu momento la
junulo turnas la radojn de la historio.

Junulo, rigardu la idealon!
Kaj aliru paŝon post paŝo al la celo!
Sed kie, kia celo ĝi estas?
Kaj kiun idealon la junulo devas
havi en la nuna cirkonstanco kiam
la sorto de la mondo staras kvazaŭ
ĝuste antaŭ kruta abruptaĵo?
La celo havigi al si blondan
belulineton kiel edzinon kaj veturi
kune kun ŝi al bela vilao ĉe
pitoreska apudmaro, tio povas
esti unu el la idealoj.
Studi teoriojn en malluma studejo
kiel iu profesoro, tio povas esti unu
idealo. Sed ĉu tiuj idealoj estas
pravaj? Ne tiom!
Jen, rigardu la stratojn! Malfermu
la fenestrojn!
Multaj sociaj malbonoj krias
plibonigon antaŭ niaj propraj okuloj.
Ili atendas la fortojn, la manojn
de la junulo.
Kiu donas la respondon al la
demandaj rigardoj de tiuj ekster
la fenestroj?

La idealo de la junulo devas esti
sentema je la postulo de la historio,
kaj plie devas koincidi la
evoludirekton de la historio. Do, tiu
idealo ankaŭ devas inkluzivi la

JUNULO KAJ IDEALO

liberecon kaj la dignon de la individuo. Ankoraŭ hodiaŭ suferas multaj homoj sen ambaŭ tiuj, kaj eĉ sub la bela nomo de demokratismo, homoj estas daŭre persekutataj kiel bovoj kaj ĉevaloj. Sen la digno de la individuo, ne povas esti individua libereco; kaj sen la libereco ne povas esti egaleco ne nur inter personoj sed ankaŭ inter popoloj kaj nacioj.

La egaleco inter ĉiuj kaj la

interpaciĝo surbaze de tio devas esti la komuna celo de la tuta homaro. Kaj tial ĉiuj religioj, ĉu orientaj, ĉu okcidentaj, celas ĝuste tion, kaj ankaŭ tiel nomataj bonfaraj movadoj, inkluzive Esperantisman, ĝuste same celas tion. Ĝi ne povas ne esti la plej altstadia kaj nobla idealo de la junulo.

Fine, lasu la demandojn al la verda junulo.

Kiun idealon la junulo, vi mem,

devas havi?

Por kio vi dediĉos vian vivon?

Kial Dio vin sendis en la mondon?

Por ŝarĝi la socion per malbonoj aŭ senigi ĝin je ili?

Homo kun konscienco povas nur unumaniere respondi. Se junuloj kun tiu nobla idealo estas multaj, kaj la junulo mem havos la fortan konvinkon morti por sia idealo, tiam la morgaŭo de la tuta homaro lumiĝos kaj heliĝos!

Taekeng Kim

HEROLDO

DE ESPERANTO

La plej ofte aperanta populara Esperanto-gazeto
De 40 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 20 numeroj jare
- ☆ Ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la Legantoj

Jarabono: 4 us. dol.

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj, U.E.A. aŭ rekte ĉe la Redakcio:
13 rue de la Reinette—Pijpelingstr., Bruselo 1

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

Ĉu sesa senso?

Oni bandaĝis la okulojn de Rosa Kuleŝova tiel ke ŝi ne povis vidi. Ŝi movis la fingrojn de la dekstra mano trans la presita teksto kaj "legis" ĵurnalon. Denove senvide ŝi "rigardis" foton per la fingroj kaj ĝuste priskribis la pozicion kaj aspekton de la homo en la bildo. Oni metis pecojn de kolora papero en netravedeblan paperan koverton. Ŝi tuŝis ĉiun pecon kaj ĝuste identigis ĉiujn kolorojn.

En publika provo antaŭ la Urala Sekcio de la Psikologia Societo de Sovetunio, Rosa metis la manojn en fermitan sakon kaj elprenis ĉiam prave la bobenojn de koloraj fadenoj kaj la ludkartojn kiujn oni petis. Ŝi priskribis la bildon sur poŝtmarko simple per ties tuŝado.

Jen kiel Rosa mem klarigas sian rimarkindan kapablon. Kiam ŝi tuŝas koloran surfacon, ŝi perceptas unu koloron kiel ondan linion, alian kiel punktojn, alian kiel krucojn. Sammomente, vida koncepto de la koloro envenas ŝian menson.

Rosa evoluigis nekutiman tuŝan senson per persista ekzerco kiam ŝi laboris en lernejo por blinduloj en la urbo Niĵni Tagil. Post atako de reŭmatisma encefalito, ŝia tuŝa senso fariĝis pli akuta, ĝis tiu punkto kie ŝi povis "vidi" kolorojn per la fingroj.

La mistero de Tagil skuis la sciencistan mondon. Homoj estis supozintaj dum miloj da jaroj ke ekzistas nur kvin sensoj — kaj nun ili subite ricevas informon ke eble estas sesa! Oni invitis Rosa Kuleŝova al la Instituto pri Problemoj de Informtransmisio, de la Akademio de Sciencoj de Sovetunio. Jen kion raportis la gazeto Izvestia:

Vidado per la fingropintoj

Frue en decembro Rosa Kuleŝova venis al Moskvo je invito de la Instituto pri Problemoj de Informtransmisio, de la Akademio de Sciencoj de Sovetunio. La Biofizika Instituto kontrolis la hipotezon pri ŝia lumsentemo. Ĉi tiu nekredibla fakto rezultis el tuta serio de provoj — Rosa havas verajn lumricevilojn, vidorganojn, en la haŭto de la fingroj. — Malfacile kredibla? Jen la eksperimentoj.

La unua eksperimento celis ekscii ĉu Rosa distingas lumajn makuletojn disde mallumaj laŭ la relativa glateco de la surfaco. Kiam oni projekciis bildon sur netravedeblan vitron, estis evidente ke la malglateco de la polurita surfaco neniel rilatas al la multeco de ĝia lumigado. Rosa diferencigis la lumajn kaj mallumajn makuletojn sur la vitra ekrano per la fingroj. Nur unu konkludo eblis: la pintoj de la manoj de Rosa, kiel niaj okuloj, reagis al ordinara lumoj; pli klare dirite, ili vidas. Ĉio estis tiel eksterordinara ke eĉ la eksperimentantoj ne povis dum la unuaj kelkaj minutoj kredi la


proprajn rezultojn. Sed venis al ili la ideo ke eble la fingroj de Rosa ne reagis al lumoj, sed al ŝanĝoj de temperaturo. La lumaj partoj de la ekrano estas pli varmaj ol la mallumaj, eĉ se nur per unu centono de grado. Du specialaj lumfiltriloj nuligis tiun hipotezon. Unue oni metis unu filtrilon antaŭ la celitan ekranon por kapti la infraruĝajn (varmigajn) radiojn. Rosa prave diferencigis la lumajn kaj mallumajn partojn kiel ŝi antaŭe faris. Poste oni uzis filtrilon por kapti la lumon kaj lasi la infraruĝajn radiojn pasi preskaŭ sen interrompo. Kvankam iuspeca varmfiguro montriĝis sur la ekrano, Rosa ne povis ĝin detekti. Do, la eksperimentantoj devis forĵeti la hipotezon pri supersentema varmosento kune kun tiu pri supersentema tuŝsento. Restis nur vidpovo — vidpovo per la fingropintoj!

Kiam la junaj fizikistoj kiuj okupiĝas pri la problemoj de vidado fine akceptis la ideon ke la fingroj de Rosa estas ja vidorgano, ili decidis mezuri ĝiajn kapablojn objektivite. Tiucele ili faris serion de provoj similaj al tiuj kutime faritaj en okulekzamenado. Dorsenmarŝu malrapide de malfermita ĵurnalo. Kio okazas? Unue la formoj

de la literoj malpreciziĝas; poste ankaŭ la linioj kuniĝas en unu grizan areon. Kiam la okuloj distingas du najbarajn punktojn, kaj kiam la punktoj kuniĝas? La figuro de la punktoj, multe reduktite laŭ grandeco, kompreneble, fokusiĝas sur la retinon (la lumsenta konustavolo ĉe la malantaŭo de la okulo) pere de la kristaleca lenso. Se la punktoj trafas malsamajn konusojn, ili estas distingeblaj; se ili trafas la saman parton de konuso, ne eblas ilin distingi. El tio sekvas la simpla konkludo: Ju pli alta la denseco de lumsentaj elementoj en la retino, des pli akra la vidpovo.

Kiel oni apliku tion al la kazo de Rosa? Ĉu ŝiaj fingroj estas akrevidaj aŭ ĉu ĉiu fingro havas nur unu lumricevilon? Kun specialaj desegnaĵoj (linioj konsistantaj el punktoj lokigitaj je variaj distancoj) oni eltrovis ke Rosa havas proksimume dek lumsentajn elementojn en ĉiu kvadrata milimetro de la fingropintoj!

La venonta demando estas unu el la plej malfacilaj: Kiel Rosa diferencigas kolorojn? Ni scias ke kolorvido de la homo estas tridimensia. Ĉiu konuso havas tri lumricevilojn — unu reagis pli bone al bluo, la dua al ruĝo, kaj la tria al verdo. Ĉiuj tiuj riceviloj



ankaŭ "sentas" aliajn kolorojn, sed la reago al la aliaj koloroj estas rimarkeble pli malforta. Tial eblas formi por ĉiu ricevilo spektran karakterizon, kiu montras kiom multe ĝi estas ekscitebla de tiu aŭ alia koloro.

Iu lumo kiu falas sur konuson agas je ties riceviloj, kaj rezulte du aŭ eĉ tri signaloj ekestas. La komplika komputilo de la cerbo diferencigas kolorojn pere de la maniero laŭ kiu tiuj signaloj kunrilatas.

Ce f-ino Kuleŝova, oni konkludis ke ŝiaj fingroj havas tri specojn de lumriceviloj — por ruĝo, bluo kaj verdo — kies grafikajo de spektra sentemo precize similas al la konusoj de la homa okulo. Je ĉiu eksperimento la simileco inter la lumsentemo de la fingropintoj de Rosa kaj tiu de niaj vidorganoj pli kaj pli evidentiĝis.

Se ni rapide moviĝas de ruĝo al grizo, ni vidas bluson. Rosa perceptas tiujn samajn kolorŝanĝojn per la fingroj.

Unu plian aferon oni konstatis — ke ŝiaj fingroj funkcias interne de la samaj limoj kiel niaj okuloj rilate luminerton, fenomeno kiun ni bone konas en ordinara vidado. Luminerto klarigas kial ni ne rimarkas fluktuaĉon ĉe kineja aŭ televida ekrano. La okulo, kvankam ni ne konscias pri tio, konstante moviĝas. Se la moviĝo ĉesas, ni ankaŭ ne plu vidas. Pro la sama kialo f-ino Kuleŝova devas daŭre movi la fingrojn por igi ilin "vidi".

La aŭtentike pruvita dua vidpovo de Rosa rekte rilatas al la laboro de sciencistoj en multaj studkampoj, precipe de tiuj kiuj laboras en studado de evoluo de vivaj organismoj. Ĝi povas helpi al ili kompreni kiel la sistemo de lum- kaj kolorpercepto evoluis, kiun formon ĝi havis komence, kaj kie la specialigita vidorgano, la okulo, ekestis. Histologoj tucerte klopodos eltrovi kie la lumsentaj elementoj situas, kaj kiel ili formiĝas. Cibernetikistoj havas tutan serion de novaj enigmoj — kiel la kolorsignalo transmisiĝas de la okulo al la cerbo, kiel ĝi kodiĝas kaj deĉifriĝas, kiel ĝi interagas kun aliaj signaloj, kaj kiel la procedo de figurrekono okazas.

Inter la grandaj demandoj kiujn levas la fenomeno de Tagil eble la jena plej

gravas: ĉu la fingroj de aliaj homoj ankaŭ sentas lumon aŭ ĉu ĉi tiu estas doto nur de Rosa Kuleŝova?

Post nelonge la demandon oni respondis per plia serio de eksperimentoj. Jen kion diris pri ĝi la populara soveta gazeto Scienco kaj Vivo:

Distingo de koloroj per la fingroj

Docento Abram Novomeiski, estro de la psikologia laboratorio de la Instruista Kolegio de Niĝni Tagil, vizitis nian redakcion por informi nin pri la konkludoj atingitaj de la Uralaj sciencistoj kiuj studis la "fenomenon Tagil". Kiam li finis sian rakonton, li sugestis al la ĉeestantoj ke ankaŭ ili klopodu konstati ĉu ili povus lerni distingi kolorojn per la fingroj. Boris Maliŝev, artisto, proponis sin por la eksperimento. Docento Novomeiski bandaĝis liajn okulojn per malhela tuko tra kiu lumo ne povis eniri.

"Mi faras tion ne precipe por certigi

ke vi ne kaŝrigardu, sed por malŝalti vian vidinstrumenton kaj igi vin plene okupiĝi pri tuŝentoj.

Oni metis zorge viŝitan vitraĵon sur la tablon, kaj sur ĝin oni metis du foliojn de kolora papero: flava kaj ruĝa. "Komence la koloroj devas esti puraj, ne miksitaj, kaj la surfaco de la papero devas esti unuforma," klarigis Novomeiski. "Estas grave ankaŭ ke la fingroj de la provato estu sekaj." Unue Novomeiski klopodis igi la provaton rilatigi sian palpan senton al la koloroj. Li metis la manon de Maliŝev sur la flavan folion kaj petis lin froteti la surfacon per tri fingroj — la dua, tria kaj kvara — dum Novomeiski diris kelkfoje sinsekve: "Ĉi tiu estas flava." Oni ripetis la procedon kun la dua koloro.

Poste Novomeiski fiksis en la menson de la provato la diferencon de la sentoj kiujn donis al li la flava kaj ruĝa koloroj. Li sugestis ke Boris tuŝu la foliojn unu post la alia kaj penu konstati la diferencon de liaj perceptoj. Dum Maliŝev tion faris, Novomeiski diris al li la koloron de la folio kiun li tuŝas.

KONTAKTO antaŭsupozas du flankojn

Denove ni sukcesis produkti nian gazeton. Denove ni bonorde liveris ĝin al vi. Ĝi kostis al ni streĉan laboron, sed tiu laboro valoris la penon.

Ĉar ni kredas ke Kontakto ludas gravan rolon en la laboro por Esperanto.

Sed ni volas ke nia gazeto atingu kiel eble plej multajn junajn geesperantistojn — ĉar ĝi estas la propraĵo de ĉiu junulo kiu parolas la Internacian Lingvon: ĝi estas nia voĉo.

Tio bezonas multan laboron. Varlaboron. Verkadon de artikoloj. Paroladon al kluboj. Skribadon de leteroj. Ĉu vi ne volas helpi en tiu laboro? La esperantistaro povas helpi per: aliĝo al UEA kiel MA-K aŭ JMA, aŭ abono de Kontakto; kontribuado al la Fondaĵo Junulara Gazeto; varbado de reklamoj por Kontakto; varbado de abonoj kaj aliĝoj; sekretaria helpo; ideoj. Kion vi faros por helpi?

KONTAKTO antaŭsupozas du flankojn

Informoj de: Kontakto,
UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

Post kvin minutoj Maliŝev komencis iome senti la diferencon inter la koloroj. Li diris: "La flava papero ŝajnas esti pli poreca kaj glata, kaj la ruĝa glueta."

"Bone," diris Novomeiski. "Tio kion ni faris estas proksimume starigi refleksan reagon. Nun ek al la provoj." Li interŝanĝis la du foliojn sur la vitro kaj demandis al la artisto, kiu koloro estas kiu. Post nur kelkaj sekundoj Maliŝev ĝuste nomis la kolorojn.

Nun la sciencisto igis la provon pli malfacila. Li trudis trian folion sur la vitron, intermiksitis ilin, kaj petis al Boris nomi la kolorojn. Maliŝev palpfortis la foliojn unu post alia kaj diris: "Ĉi tiu estas flava, ĉi tiu estas ruĝa, kaj ĉi tiu ankaŭ ruĝas." Tute prave.

"Nun klopodu distingi la koloron de la papero sen helpo de komparado," la docento sugestis.

Li metis unu folion sur la vitron. Boris tuŝis ĝin, pensis dum sekundo, frotis ĝin denove, kaj nomis la ĝustan koloron.

"Tre bone," diris la sciencisto, evidente ĝoja. "Via sukceso en ĉi tiu provo montras ke vi komencas fiksi la kolorojn en via menso ne laŭ la diferenco de sentoj sed per asociigo de difinita sento kun difinita koloro. Nun mi donos al vi pli komplikitan taskon."

Li kovris la kolorajn foliojn sur la vitro per travidebla paŭspapero, kun la neglata flanko supre. "La paŭspapero igos iom pli malfacila la percepton de la koloroj," li klarigis, "sed mi volas fari la provon pli rigora per ekskluzivo de iu influo kiun povus kaŭzi la koloraj surfacoj mem je via percepto."

Kaj ĉi-foje Maliŝev ja bezonis multe pli longan tempon por elcerbumi la diferencon de siaj sentoj antaŭ ol nomi, ĝuste denove, la kolorojn de la folioj sub la paŭspapero.

Poste alia artisto sidigis ĉe la provotablo. Li sukcesis en ĉiu provo, kaj pli bone faris ol sia antaŭulo per ĉi tiu aldona provo.

"Se oni metas du foliojn de kolora

papero unu sur la alian," la docento diris al la ĉeestantoj, "pro iu stranga kialo la dominan senton produktos la koloro de la suba folio."

Li metis du foliojn, flavan kaj ruĝan, antaŭ la provaton kaj petis lin identigi la kolorojn. La respondoj estis ĝustaj. Poste, Novomeiski intermiksitis la foliojn, puŝis ruĝan folion sub la flavan, kaj sub la ruĝan plian flavan folion. La provato tuŝis la suprajn foliojn kaj senhezite nomis la kolorojn de la du subaj folioj.

"Do, vi sciu," resumis Novomeiski, "la fingroj de viaj artistoj estas tute ne malpli sentemaj ol tiuj de f-ino Kuleŝova."

"Ĉu Rosa kapablas distingi ankaŭ la formon de la figuro kaj ne nur la kolorojn?" iu demandis.

"Ankaŭ tion oni povas lerni," respondis la docento. "Mi iome eksperimentis kun miaj studentoj. Post iom da ekzerco ili kapablis konstati la limojn de du koloroj, kaj poste la formon de la figuro."

"Jen mia metodo. Ni metis foliojn de nigra kaj blanka papero sur vitron. La provato lernis kiel diferencigi unu koloron de alia. Post kiam li tion regis, oni petis al li determini la limojn de la figuro de simpla nigra formo (sed formo kiun li ne konis antaŭe) sur blanko fono. Post ripetado de eksperimentoj kun diversaj simplaj formoj, ni transiris al grandaj nigraj literoj sur blanka fono."

Kaj intertempe tute sendependa serio de eksperimentoj okazadis en Usono. Jen kiel la brita gazeto Observer raportis pri la ĝis nun atingitaj sukcesoj:

Homoj kiuj vidas kolorojn pertuŝe

Ĉu certaj homoj povas vidi kolorojn per la haŭto? Vico de raportoj el Sovetunio, Usono kaj Francujo sugestas aŭ ke kelkaj homoj posedas mirigan kaj antaŭe nekonatan kapablon, aŭ ke okazas kelkaj sufiĉe lertaj fraŭdoj.

La tutan pasintan semajnon, profesoro de psikologio el la Kolegio Barnard, Novjorko, d-ro Richard P. Youtz, eksperimentis kun dommastrino en la urbo Flint, en Michigan, s-ino Ferrell

Stanley, kiu ŝajne kapablas distingi la kolorojn de pecoj de ŝtofo per la manoj en "lumhermetika" kesto. En Parizo, la eminenta aŭtoro Jules Romain, nun 79-jara, klarigis lastatempe en Les Nouvelles Littéraires kiel li faris similajn eksperimentojn je si mem kaj je aliaj homoj antaŭ 44 jaroj — kun konsternaj rezultoj. El Sovetunio, la novajagentejo Tass denove raportis pri la pretendoj de la 22-jara Rosa Kuleŝova, kiu, kiel pasintjare oni informis, kapablas ne nur percepti kolorojn per la fingroj, sed ankaŭ legi tekstojn sen la okuloj. Kiel fidindaj estas ĉi tiuj raportoj?

Profesoro Youtz asertas ke li estis ege skeptika komence. Li aŭdis pri s-ino Stanley tute hazarde, kiam kolemino menciis knabinon kiun ŝi instruis antaŭ multaj jaroj en gimnazio en Kentucky; la knabino elmontris rimarkindan kapablon identigi malsimilajn objektojn nevidante.

Pasintan someron, d-ro Youtz elspuris la knabinon — nun s-ino Stanley, 42-jara, kaj patrino de kvar filoj. Li eksperimentis kun ŝi dum 60 horoj, kaj trovis ke ŝi ankoraŭ posedas sian "talenton".

Por la eksperimentoj, d-ro Youtz uzas lignan keston nigre farbitan interne, kaj ekipitan de manikoj el nigra veluro kun elastaĵo ĉe la manumoj. S-ino Stanley puŝas la manojn en la keston kaj tuŝas pecojn de kolora ŝtofo, aŭ kvadratojn de kolora papero kovritajn de maldika plastaĵo.


Post tridek sekundoj ĝis du minutoj, ŝi nomas la koloron, kaj pravas dum la plejmulto de la fojoj. La provoj inkluzivas "duoble blindajn" procedojn, tiel ke nek d-ro Youtz nek s-ino Stanley konas antaŭe la kolorobjektojn en la kesto.

Profesoro de fiziko ĉe la Kolegio de Flint (Universitato de Michigan) ĉeestis kelkajn el la eksperimentoj, kaj foriris konvinkita.

D-ro Youtz nun ricevis stipendion de la Nacia Instituto de Mensa Sano por ebligi al li vojaĝi inter Novjorko kaj Flint por daŭrigi la laboron.

Li trovis ke la kapablo de s-ino Stanley malaperas kiam ŝiaj manoj estas malvarmaj — sub 24 gradoj (kutima temperaturo: 30 ĝis 32 gradoj) — sed ke magnetoj aŭ elektraj kampoj neniel efikas je ĝi.

D-ro Youtz kredas ke la kapablo eble



dependas de varmecoj el la manoj reflektita aŭ sorbita per la koloraj objektoj. Li ne kredas ke s-ino Stanley posedas iuspecan ekstersensan percepton.

S-ino Stanley mem, kiam oni demandas al ŝi kiel ŝi distingas la kolorojn, diras: "Mi ne povas klarigi. Vortoj por priskribi la aferon mankas; sed temas pri la sento de la koloroj." Ŝi diras ke helaj koloroj ŝajnas "pli maldikaj kaj pli glataj", kaj malhelaj koloroj "dikaj kaj malpli glataj." Aldone ŝi klarigas: "Oni bezonas multan atentemon por ĝuste nomi la kolorojn."

D-ro Youtz lastatempe provis 135 studentinojn de la Kolegio Barnard, kaj trovis ke 20 montris indikojn ke ili posedas la saman kapablon kiel s-ino Stanley, en malpli evoluinta formo.

Li diris ke skeptikuloj prefere ripetu ĉi tiujn eksperimentojn kun iu ajn ducento da studentinoj. Li antaŭvidas ke post unuhora ekzerco kun la "nigra kesto", 15 ĝis 20 procentoj de la provatoj pravos pli ofte ol hazardprobablo. Kelkaj el tiuj ĉi povus esti trejnataj por evoluigi veran kapablon "legi" kolorojn.

S-ino Stanley povas labori en mal-lumo, sed "komencantoj", laŭ d-ro Youtz, pli bone faras, pro iu nekonata kialo, kiam oni metas lampon en la keston.

Estas pli malfacile kontroli la sovetajn pretendojn. La plej konvinka fakto pri la provoj ĉe Rosa Kuleŝova estas tio ke observis ilin plej eminentaj psikologoj inkluzive profesoron Luria, kiu estas bone konata kaj respektata inter niaj sciencistoj.

Profesoro Luria skribis al d-ro William Rushton, de la Fiziologia Laboratorio de la Universitato de Cambridge, dirante ke unue li pensis ke la tuta afero "similas al flugantaj subtasoj", sed post vido de eksperimento, li plene konvinkigis interne de dudeko da minutoj.

Intertempe la rusoj pretendis ke ili eltrovis plurajn pliajn homojn kun "tuŝoptika vidpovo". Pluraj studentoj de la Instruista Kolegio de Nijni Tagil, en la Ural-montaro, laŭpretende kapablas distingi kolorojn per la

fingroj (ĉi tiu raporto paralelas la eltrovojn de profesoro Youtz ĉe liaj studentoj); kaj krome 9-jara lernantino el Karkov, Lena Bliznova, kaj 37-jara Leningradano, Ninel Kulaĝina, laŭdire ankaŭ posedas la kapablon.

Fine, estas Jules Romain en Francujo, kies libron "Senokula Vidado" oni aperigis en la angla lingvo en 1924. En la libro la verkinto asertas ke li elmontris rimarkindan "eksterretinan percepton" en pluraj provatoj dum io kion li mistere nomas "reĝimo delto" — kio ŝajnas esti iuspeca hipnota stato.

Poste, pere de 150 horoj da daŭra kaj ofte laciga peno, li instruis al si praktiki ĉi tiun kapablon. Li pretendas ke li povis legi tekstojn kaj percepti objektojn kiam la okuloj estis tute bandaĝitaj.

Romain firme kontraŭstaras iun "mistikan" klarigon, kaj la tono de lia libro estas plene racia. Li diras ke li povis "vidi" des pli bone ju pli li malkovris la haŭton de la brakoj kaj la brusto, kaj li kredas ke temas pri mikroskopaj sensorganoj en la haŭto.

Estas vere ke ekzistas multaj etaj sensorganoj en la haŭto, kies funkcion oni ne difinis, sed ili estas tre primitivaj, kaj modernaj fiziologoj simple ne povas akcepti ke ili povus anstataŭi la okulon.

Lastatempe s-ro Romain asertis ke la rusaj kaj usonaj sciencistoj ignoris liajn pruvojn kaj "ripetis unu dudekonon de la eltrovoj kiujn mi faris kaj raportis jam en 1920."

La artikolon en Observer sekvis vico da leteroj al la redakcio raportantaj pri eĉ pli fruaj manifestoj de ĉi tiu stranga fenomeno. Unue venis letero kun la jenaj informoj: "En 1880 du britaj kuracistoj informis ke certa s-ino Croad, 40-jara, kiu estis tute blinda jam de dek jaroj, montris indikojn de transigo de sentumo de la okuloj al la fingroj kaj plato de la dekstra mano... En 1882 Lambroso raportis pri simila kazo de itala knabino;

ĉe ŝi la flarpovo kaj la vidpovo estis ambaŭ relokitaj. En 1893, du usonaj kuracistoj, Speir kaj Ormiston, raportis ke kvankam la okuloj de f-ino Mollie Fancher, de Brooklyn, estis blindaj, ŝi "vidis" tra la supro de la kapo. Ŝi ankaŭ povis legi "en lumo aŭ mallumo" per transigo de la fingroj laŭ presita teksto."

Du postaj leteroj montris plurajn similaĵojn inter la lastatempaj eksperimentoj kaj pretenditaj antaŭaj manifestoj:

"Frua ekzemplo de 'fingrovido' troviĝas en unu el la leteroj de Soldato Wheeler. Skribante el Zante je 19 majo 1826, li diras: 'La homo kiu funkciigas la manĝejon en la kastelo estas blinda; plej eksterordinare estas ke li faras ĉiun sian laboron sen helpo. Ĉi tiu homo povas distingi kolorojn per la tuŝo. Se oni petas iun silkfadenon de certa koloro, li neniam elektas la malĝustan.'" La alia letero priskribas ekzemplon el la deksepa jarcento. Temas pri raporto de iu d-ro Finch al la konata sciencisto de tiu epoko Robert Boyle:

"John Vermaasen... absolute blinda... dum konversacio kun li dumnokte, la blindulo asertis ke li povas distingi kolorojn per tuŝo... Por identigi la koloron de rubando, li metas ĝin inter la polekson kaj la duan fingron... Poste la kuracisto deziris scii kian diferencon li trovis inter koloroj per la tuŝo. La blindulo respondis, ke la diferenco kiun li konstatis estis pli aŭ malpli alta grado de glateco; ĉar, li diras, migro similas la pintojn de kudriloj, aŭ iu akra sablo, kaj ruĝo ŝajnas tute glata."

Knabo kun pakajo

La kapitano ekbruligis la cigaredon. Tra la buŝangulo li elblovis grizan fumon. Plenpulme li eksuĉis ankoraŭfoje kaj la cigaredon li metis sur la randon de la cindrujo. Blueta fumturo ondis suprendirekte kaj ĝi ŝvebe alfloris sub la lumŝirmilon de la tablolampo.

La knabo rigardis avide la fumon. La salivo kunfluis pro ekdeziro en lia buŝo. Seke li eklutis, kvazaŭ homo kiu sufokiĝas.

Domaĝe pro tiu cigaredo. La bonodoro nur brulas, forfumas, disflugas en la nenion, en la aeron, senutile. Kun Cirulo eĉ tion ili priuzis. Hieraŭ, apud la brokantvendoplaco "Eĉeri", ĉe la barilplektaĵo. De ia ŝarĝoĉaristo ili ricevis unu cigaredon "Kossuth". Duope ili ĝin fumis, kun Cirulo, alterne unu post la alia. Cirulo estas lia amiko. Unu el ili ĝin suĉis, la alia sin alklinis super la fumon. Manplate tiu faris funelon kaj tiel ĝin kaptadis plenuŝe.

Malantaŭ la skribotablo kun klinita kapo la kapitano sidis. Li skribis. La plumon de tempo al tempo li trempis en la inkujon. Pri li la kapitano skribis.

Laca muŝo baraktis malantaŭ la kurteno de la fenestra vitro. Ĝi volis flugi, sed ĉiuprove ĝi alpuŝigis al la faldetoj de la kurteno. Li ekkompatis ĝin. Oni devus ĝin liberigi! Perfingre li streĉe eltiris iomete la kurtenon. La muŝo trenis sin en la kontraŭa direkto. Kiel stulta tiu muŝo estas! — li pensis. Helpi li volas al ĝi, kaj ĝi forflugas.

Ĉu ankaŭ al li oni volas helpi!? Kiu sciis tion? La kapitano nur skribas; depost ke li starigis lin ĉe la fenestron, li ne parolis. Kvazaŭ li eĉ ne ĉeestus.

La sorbopapero frapsonetis sur la folio. Li rekaptis la manon de sur la kurteno.

"La ŝtelon mi eĉ ne menciis, Aleksandro," ekparolis la kapitano amikvoĉe. "Sciu, ĝi vere eĉ ne estas ŝtelo. Ankaŭ la ŝtelo havas gradojn. Plie ĝi estas", li gratis la frunton, "nu, kiel, mi diru, eraro. Miŝpaŝo, stumblo. Jes, stumblo. La ĉevalo havas kvar piedojn, iafoje tamen ĝi ekstumblas. Certe vi jam aŭdis tion."

Ankaŭ Avino kutimas diri tion. Kara, karega Avino! Tiam lastokaze ŝi diris tion, kiam en ilia strato la meblista helpilaboristo Löwy ŝtelis lignotabulon. La knabineto mortis en la kolonio, al ŝi li volis fari ĉerkon. Stellabore. Lia avino mallaŭdis la blokkonfidulon, ke el tiel malgranda afero li faras tiel grandan skandalon. La efektive verajn ŝtelistojn oni devus kaptaresti, ne la ĉitiajn! — ŝi grumblis, kiam la policano forkondukis Löwy. Kvankam estas malfacile iradi por lia avino. Per bastono ŝi iras. Si revadas pri brakseĝo, en kiu ŝi povus sidripozadi. Sed lia avino havas nur tabureton. Lignotabureton.

"Sed ja la ĉevalo, ĝi estas ĉevalo," daŭrigis la kapitano. "Besto. Kaj la homo", li laŭtigis la voĉon, "per tio li estas

plia, ke li pensas. Antaŭe pensas, poste agas... Kvankam troviĝas homoj..." La kapitano subite eksilentis. Li rigardadis enpensiginte la ardaĵon de la cigaredo.

La knabo ŝtelrigardis al la strato, tra la breĉo de la kurteno.

Sube, sur la pavimo, aŭtoj susurglitis. Sur la trotuaro infanoj tretillumis. Neniam li havis tretilon. En la hospitalo, kiam oni lin estis operaciinta kaj li jam komencis resaniĝi, li elmuntis la radon de la malsanultransporta puŝĉareto, sed la flegistino ĝin forprenis de li. Kvankam ĝi estus taŭginta por tretiltrado.

Antaŭ granda meblotransporta ĉaro du pezkorpaj ĉevaloj trenpaŝadis. La karno tremadis sur ili. Li atentis la piedojn de la ĉevaloj. La glataj, eluzitaj hufiferoj ekbrilis kelkfoje en la sunlumo. Sur kruro de unu ĉevalo, ĉe la kokso, leda ujo. Kvazaŭ ĝi estus bandaĝo. Ĉu eblas, ke per tiu sia piedo ĝi stumblis?

"Kvar laktobotelojn mi skribis, Aleksandro", demetis la plumon la kapitano. "La bierbotelojn mi eĉ ne mencias. Nek la mineralakvaj. Kvar laktoboteloj, ĉu ne, tio kostas dudek forintojn, por tiom oni ilin reaĉetas. Tiom ĉi ja sufiĉas. Nure pro formaleco.

La laktobotelo estis la ekideo de Cirulo. Li eĉ koleras al li pro tio. Ili ricevis por la malgrandaj bierboteloj nur du kaj duonan forintojn. Cirulo diris, ke tio ne estas negoco! La laktobotelo estas pli altpreza. Ili vidis jam frumatene tra la fenestro, kiel la transportlaboristoj kun ledaj antaŭtuko demetis la kradkestojn. Ankaŭ unu ladan laktujon ili demetis. En ĝi estis laktokremo. Cirulo streĉdeprenis ĝian kovrilon kaj per du mankavoj li ŝtopis en sin la laktokremon. Li eĉ ne gustumis ĝin. Tri botelojn da lakto ili trinkis kune, ĉe la apudkonstrueja brikstaplo. Ili elverŝis unu da ili en la stinkfosajon. La lakto tiom blovŝveligis Cirulon — antaŭe li manĝis abrikoton —, ke li vomis. Ia virino ilin alkriis. Ili forkuris. Sur la ĉirkaŭbaritan grundon ili ensaltis. La lignotabuleto de la barilo rompiĝis sub Cirulo. La tabulo kraksonis laŭte.

La kapitano klinapogis la dorson en la brakseĝo. "Al via avino mi eĉ ne mencias la aliajn botelojn," li ekparolis. "La afero ŝin ne koncernas detale. Kaj mi ankaŭ ne volas, ke ŝi afliktiĝu pro vi. Ŝi tre fidas je vi, Aleksandro. Ŝi diris, ke vi estos ŝia apogo. Vi havas fortajn manojn, ankaŭ tion ŝi diris. Vi ŝatas ĉionfaruladi. Nu vidu, tie en la instituto ankaŭ por tio vi havas eblon. Kamarado Bertalan, la direktoro, estas tre helpema homo..."

La knabo malsuprenklinis la kapon. Denove li trafos instituton. Ree instituto. Kie lastokaze li estis, tie li ne ŝatis restadi. La knaboj lin primokis, Ili diris al li: bastardo! Li ja ne estas bastardo. Li havas avinon, kiu lin amas. Ŝi

Kaj jen, do, la ĝisnuna evoluo de la rakonto. La eltrovoj levas multegajn demandojn, pluraj pozitivaj, pluraj negativaj. Kial la sciencistoj ne pli vaste konstatis ĉi tiun fenomenon antaŭe,

se entute ĝi estas tiel disvastigita? Kial pli da blinduloj ne evoluigis la kapablon? Se homoj povas esti trejnataj evoluigi "tuŝoptikan kapablon", kio estos la efiko ĉe instruado de

blinduloj, ĉe la ĝisnuna teorio pri senspercepto, ĉe psikologio, ĉe fiziologio? Eble la homo staras ĉe la sojlo de nova efikoplena scienca eltrovo. Nur tempo kaj laboro certigos nin pri tio.

estis ankaŭ tiu kiu lastokaze la paperon subskribis, per kiu li povis forlasi la instituton. Vere, tiam jam dufoje li eskapis. La direktoro tie ne nomiĝis Bertalan. "Kamarado Bertalan ŝatas la malfacilajn kazojn," ekspiris la kapitano profunde. "Sed vi ja vere tute ne estas malfacila kazo, kiel ni faktermine kutimas diri. Vi estas, kiel mi diru, ĝenerala bubkazo. Ja dum kreskado vi forlasos tion, Aleksandro! Ja iam ankoraŭ vi fariĝos honestulo! Jes ja! Ni aŭdos ankoraŭ bonon pri vi. Bonon, ĉu ne? Nur bonon. Tion ni ŝatas. Kaj al ni, se ian ajn plendindaĵon vi havos, ĉiam vi povos veni. Eĉ! Ni eĉ petas vin, ke vi venu. Ni aŭskultos vin. Ni amas vin, Aleksandro. Kaj fidus je vi!" Unu larmoguto rule defalis de sur la okulharoj de la knabo. Li viŝe disŝmiris ĝin per pugno. Tiel li palpebrumis al la



kapitano, el sub la antaŭbrako, kvazaŭ li kaŝus la vizaĝon kontraŭ atako. La kapitano sidis en la brakseĝo. Li klinis la dorson al la apogilo de la seĝo, li klinadis sin balance antaŭen, dorsen, kvazaŭ li rajdus. Li premeŝtis la cigaredstumpon en la cindrujo.

"Kaj ĉi tion", li montris permane al la multo da aĵaĉoj, dispake metitaj sur la tablo, "vi povas kunporti. Senvaloraj forĵetaĵoj. Ŝnuroj, najloj, tolbendpecoj. Ne estas inde ilin inventari, deponmeti. Tiu ĉi vakstolpeco, ĝi estas ankoraŭ, mi ne neas, uzebla. Sed la magazeno ĝin ne pretendas; kaj kial por ni ja ĝi estu tie ĉi, ĉu por kolekti polvon? Belkolora ĝi estas, punca. Verŝajne la punca koloro plaĉas al vi, Aleksandro... Kaj tiuj ĉi du risortoj estas tute rustaj, unu estas eĉ rompita." La kapitano premadis la risorton sur la tablo, — "ankaŭ ili valoras neniom. Al brokantvendoplaco ili indas, eble eĉ ne al tie. Nu, do kunkaku ilin, jen ĵurnalo, en ĝin vi povas ilin kunmeti. Atendu, jen, per tio vi povas ĝin ĉirkaŭligi", li etendis al li pecon da ŝnuro.

La najlojn li balais en sian manon. Cirulo tiujn elprenis el la malbona lavujo, kiam ili ŝtelumadis ĉirkaŭ la dika Eĉeri-strata brokantistino. Ŝi havis aĉetantojn. Pri ia forno kun nomo "Fulmo" tiuj marĉandis. Dum la virino montradis la fornon, Cirulo kapte prenis la najlojn. Ankaŭ bulon da malpuraĵo li kunprenis... Por la risortoj la raŭkvoĉa brokantisto postulis kvar forintojn. Eĉ tiom ne valoris tiuj. La brokantisto trompis ilin, ĉar unu el tiuj estas rompita... La tolbendpecon ili detranĉis per razilklingo de sur la sidloko de transportĉaro. La laboristoj biertrinkadis en la trinkejo, furaĝsako estis pendfiksita al la kapo de la ĉevaloj, tute ĝis super la okuloj... Pro la vakstolo oni lin kaptis ĉe la enirejo de la magazeno. Ĝin li mem akiris. Cirulo estis jam ekstere de la turnpordo. Ia viro lin kruce brakprenis kaj kondukis en la kontoron.

"Fetu eniron en la meblistan metiejon", la kapitano delikate altuŝis lian brakon. "Cetere, tion ankaŭ mi skribis en la raporto. Mi antaŭdiras apenaŭ unu monaton, eĉ tiom ne necesos, nur du semajnoj, kaj vi povos jam fabriki seĝetojn. Poste grandajn seĝojn, brakseĝojn. Imagu, kiel via avino gojos pri vi, Aleksandro!"

Oni ekfrapis ĉe la pordo. Aktujhava, longa viro enpaŝis. "Nu, kamarado Kiss, vi ambaŭ povas ekiri. Tiun ĉi akton prenu. Subskribigu la ricevatestilon. Se mi jam ne estos tie ĉi, kiam vi revenos, metu ĝin tien ĉi, sur mian tablon." La longulo transprenis la paperon kaj garde ĝin metis en la aktujon. Li kuntiris la zip-fermilon. La kapitano glatordigis per ambaŭ manplatoj la harojn. Li sin streĉetendis, poste per tiraj paŝoj li ekiris al la pordo. Subite li sin returnis kaj metis la manon sur la ŝultron de la knabo.

"Tie oni ne povas cigaredfumi, Aleksandro. Ne cigaredfumu. Ĝi malutilas al vi. Al ĉiu ĝi malutilas. Konduku bone kaj ĉiam estu gaja. Se vi estas gaja, ankaŭ la malĝojo vin fore evitas. Nu, adiaŭ!"

Li etendis la manon. La knabo senkuraĝe levis sian brakon. Li sentis eĉ ankoraŭ en la tramo la varmon de la mano de la kapitano. Li sentis sur sia ŝultro lian manplaton, kiel li manpremis lin, ekskuis ludece.

Belajn, blankajn manojn la kapitano havas. Ne tiel ŝvelvejnajn, brunajn, kiel tie ĉi apud li la longulo, kiu lin akompanas.

Li tenas la paperpakaĵon ensine. La rando de unu risorto

sin elmontras el ĝi. Li turne lokigas la pakaĵon: la longulo ĝin ne vidu, Dume timeme li alokulumas lin. Sed li rigardas lin nur ĝis la talio. Sub lia akselo aktaĵo. Per ambaŭ manoj li tenas libron kaj legas. La bindaĵo de la libro havas bluan kaj brunan kolorojn. Sur ĝi kanontubo, antaŭ tio: dikventrulo kun lipharoj, okulvitroj, kiu montras per etendita brako al la kanontubo. Sajne ion li diras al iu kontraŭflanke staranto. Verne: "La kvincent milionoj de la begumo" — li legas la titolon de la libro.

Se li havus kvincent milionojn? Ĝi estas granda sumo, terure granda. Li eĉ ne memoras, ke en la lernejo ili estus lernintaj... nombri ĝis kvincent milionoj! Kvankam povas esti, ke ili lernis... Sed se li havus nur ties duonon aŭ kvaronon! Tiukaze li ne sidus tie ĉi en la tramo. Nek la longulo lin akompanus. Aŭte aŭ flugmaŝine li veturis... Kiel foje sur malpuraj, grasmakulaj, ĉifitaj libropagoj, ricevitaj de Cirulo, li legis ke la banditsuvereno vojaĝis flugmaŝine al la farloko de la krimaĵo...

Por li eĉ kvincent forintoj sufiĉus. Li pagus al la KÖZERT (kooperativa vendejo) la prezon de la laktoboteloj. La teksajbendon li redonus al la transportveturisto. Aŭ li aĉetus por li novan anstataŭe. Ankaŭ al la magazeno li repagus la prezon de la vakstolo. Kvindek forintoj certe sufiĉus por tio. Sed eĉ se centon tio bezonus, eĉ tiukaze kvarcent restus por li. Kaj li aĉetus brakseĝon por la avino. Li dirus: "Jen, avino, ne sidaĉadu sur la lignota-

eureto. En tiu ĉi vi povas bonkomforte apogiĝi. Eĉ la piedojn vi povas surmeti tien ĉi, jen, kiel belan skulptitan piedtenilon tiu ĉi brakseĝo havas? Nur ĉe grandsinjoroj estas tiaspecaĵo videbla. Vidu, nun ankaŭ vi ĝin havas, kara avino..."

Denove la larmoj surverŝis liajn okulojn. Unu guto surfalis la angulon de la paperpakaĵo, pretenita sub lia akselo. Kiom domaĝe, ke li ne havas kvincent milionojn! Eĉ ne kvincent forintojn. La prezo de la revenditaj boteloj restis ĉe Cirulo. Ili volis aĉeti cigaredojn per ĝi, vidalvide al la magazeno, en la tabakvendejo.

"Tie ĉi ni eltramiĝos," diris la longulo, kaj frapfermis la paĝojn de la libro.

Sur deklivejo ili supreniris. La longulo spiregis kaj li nur paŝadis apud li. Kun la paperpakaĵo subaksele, en ĝi la multaj aĉaĵoj. Kiel la kapitano diris. Nu tamen ne estas aĉaĵo la tuto. La risortojn vere oni devas ŝanĝi. Sed la cetero estas bona, povas resti. La vakstolo estas bele punca. Se lia avino ĝin sursidos, certe ŝi sentos, kvazaŭ ŝi sidus sur reĝa trono.

La longulo haltis antaŭ mallarĝa dratpordo. Li forviŝis la ŝviton de sur la frunto. Li lasis lin antaŭen.

La knabo prenis per ambaŭ manplatoj la paperpakaĵon, kaj tenis ĝin antaŭ si, kvazaŭ li portus jam la brakseĝon...

(El la hungarlingva originalo tradukis: Andreo Szabó)

Je aprilo 1564

William Shakespeare naskiĝis

Otelo

tradukis Reto Rossetti
Majstroverko de la Esperanta tradukarto.

Otelo estas unu el la kvar grandaj tragedioj de Shakespeare: legante ĝin oni sentas ne nur la aŭtentikan "senton" de la ora epoko de angla literaturo, kaj la intrigoplenan mondon de renesanca nobela vivo, sed ankaŭ la kontakton kun unu el la plej brilaj mensoj en la tuta historio de la homaro, kaj la plej miriga poezio kiu retenis ĉiun sian imponon tradukite en la Internacian Lingvon.

Prezo: 26,80 steloj, 6,70 ned. guld.

Mendu de:

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO - NIEUWE BINNENWEG 176, - ROTTERDAM-2, - NEDERLANDO

Angla Antologio 1000-1800

redaktis William Auld kaj Reto Rossetti
enkonduko de Marjorie Boulton

Ĉi tiu plej taŭga enkonduko al la literaturo kies majstro estis Shakespeare inkluzivas tradukojn de kvar sonetoj de Shakespeare mem kaj tutajn aktojn el la bonkonata *Julio Cezaro* kaj la eterne populara *Romeo kaj Julieta* — kune kun amasaj brilaj tradukoj el samtempoj de Shakespeare.

Bindita. Prezo: 40 steloj, 10 ned. guld.

TRAFIKOFICEJOJ

WAGONS-LITS//COOK



mondskala organizaĵo
por ĉiaj viaj vojaĝoj

Biletoj por:

- vagonaro
- ŝipo
- flugmaŝino
- turisma aŭtobuso

Specialistoj por ITÉ kaj grupaj vojaĝoj

Nederlandaj filioj en:

Amsterdam - Amstelveen (Perry van der Kar)
Arnhem - Almelo - Eindhoven - Enschede
Den Haag - Rotterdam - Utrecht

NIAJ KONTRIBUINTOJ

Taekeng Kim estas la gvidanto de la korea Esperanto-junularo. Li lastatempe transloĝiĝis al Seoul el Taegu, kie dum deko da jaroj li aktivis por Esperanto kaj prelegis en la tiea teknika kolegio. Li gajnis plurajn elstarajn sukcesojn rilate la instruadon de Esperanto en la lernejoj.

Jan Schaap desegnis la kovrilon de Kontakto. Li estas profesia artisto.

Kerstin Sällvin estas sveda junulino kaj aktiva esperantistino; la fotojn por ŝia artikolo ni ricevis de la Sveda Turisttrafika Asocio en Stockholm.

Andreo Szabó ne nur aktivas en la hungara junularo sed ankaŭ gajnis trian premion (en la fako originala prozo) en la Belarta Konkurso de la 48-a Universala Kongreso en Sofio.

Hans Bakker estas la patro de la samnoma estrano de TEJO-Nederlando kaj prezidanto de la kongresa komitato de la venonta Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Amsterdam.

La artikolon Ĉu Sesa Senso? ni kompilis ĉefe el materialo en la anglalingva revuo USSR, eldonita de la soveta ambasadejo en Washington.

NIAJ KONTRIBUINTOJ

en la printempa numero

La artikolo "Kvin milionoj da francaj gejunuloj akuzas" unue aperis en la franca gazeto Scienco kaj Vivo; ĝin tradukis **Christiane Carrigue**.

Ken Miner jam kontribuis al la unua numero de Kontakto; li estas juna usona verkisto kiu lastatempe debutis en la Esperanta literaturo.

Donald Broadribb instruas la hebrean lingvon ĉe la Universitato de Melbourne, studas por doktoriĝi, kaj (iom enigme) redaktas la gazeton Nordamerika Esperanto-Revuo; li nun planas fondon de nova gazeto pri bilbiaj studoj.

La artikolon pri Cicely Tyson ni reprenis el la angla gazeto Flamingo (Fenikoptero), kaj tiun "Pri la arto kaj scienco de neŭtraleco" el la usona gazeto Junularo kaj Libereco. **Melvin J. Lasky** estas kunredaktoro de la angla literatura revuo Encounter kaj verkis sian artikolon en 1962.

Drago Kralj estas ĵurnalisto, kaj estas bone konata precipe inter Esperantaj literaturamantoj, kiel beletristo kaj i.a. aŭtoro de la libro Kvar Prelegoj pri Esperantista Literaturo. Fotojn faris **David Boehm** (paĝo 1), **N. J. Justin** (9-11),

Drago Kralj (5) kaj **Donald Broadribb** (13). Desegnis la kovrilon **Jan Schaap**.

TIPA SVEDA FESTO

Mezsomero. Granda migrado de turistoj, scivolaj pri tiu tipa sveda festo. Al Dalekarlio ĉiuj vojoj estas tute plenstopitaj de aŭtoj kaj aŭtobusoj. Trajnoj malfruiĝas... eble pluvos, eble tondras en la plej longa tago de la jaro; sed tio ne gravas! Tamen estas Mezsomero.

En Dalekarlio, inter la ruĝaj dometoj kaj la betuloj, ĉe la bluaj lagoj, 800 tipaj svedaj muzikistoj agordas la violonojn kaj 1000 popoldancistoj dancas ĉirkaŭ ĉiu verda majstango en ĉiu vilaĝo tutajn tagojn kaj nokton. Ĉiuj manĝegas, trinkegas, ankaŭ drinkegas, ĝojas, ĝojas... jes, tio estas la festo de ia origina, pratempa ĝojo, pri la reveninta somero, kiu ĵus komencis varmigi la koron.



Popoldancado ĉe Rättvik.

Mezsomero estas publika festo en tuta Svedujo.

Je Mezsomernokto preskaŭ ĉiu urbo kaj vilaĝo revivigas la antikvajn ceremoniojn de starigo de la majstango, kiun oni kovras per betulbranĉetoj kaj florgirlandoj.



Mezsomera renkontiĝo en Svedujo!

SEJU (sveda TEJO-sekcio) aranĝas

mezsomeran renkontiĝon
en Sundsvall

Sundsvall estas havena urbo 400 kilometrojn norde de Stockholm.

La renkontiĝo okazos de la 19-a al la 21-a de junio, kaj oni aparte invitas al eksterlandaj gejunuloj partopreni. Unu reprezentanto el ĉiu lando rajtos resti unu semajnon senkoste!

Skribu tuj al:

**Ingrid Carlsson, Sjuksköterskeskolan,
Sundsvall 5, Svedujo**



Antaŭ multaj jaroj, la homoj loĝantaj ĉirkaŭ la Lago Siljan uzis ĉi-specajn boatojn por vojaĝi al la preĝejo. Nuntempe ili preferas biciklojn kaj aŭtobusojn, sed je Mezsomero oni ankoraŭ povas vidi denove tiun pitoreskan vojaĝon.

Avĉjo ludas la violonon.

Super tuta Svedio reĝas la blanka — mi preskaŭ diris "nokto" — almenaŭ ĝi neniam venas en norda Svedio dum tiu tempo. Tiu nokto estas sorĉita. Ĉiuj bonaj fantomoj: driadoj, elfoj, akvaj elfinoj, nun plenumas ĉian deziron — sed nur dum tiu nokto! La bonodoraj herbejoj nun envolviĝis per travideblaj vualoj; eble la elfinetoj forgesis ilin post la danco. La ĉielo ruĝas, la suno ne tute malleviĝas. En arbaro kelkaj nigraj turdoj kantas, tie ĉi oni ne havas timon, ĉar la mallumo estas forpelita. Tra la maldensa nebulo ni vidas lageton. Nun atentu, ĉiuj knabinoj! Ĉu vi volas fariĝi bela? Ĉu vi volas ekscii kiu estos via estonta edzo? Sekvu la tre malnovan kutimon: banu vin en la lageton (ho, tipe sveda...), ĉar antaŭ vi, banis sin la belega kaj alloga driado. Nun vi certe fariĝos bela. Atendu momenton ĝis la akvo trankviliĝis (vi nepre ne devas turni vin!). Post kelkaj minutoj vi turnos kaj vidos en la akvo la vizaĝon de via estonta edzo. Se vi ankoraŭ ne kovinkiĝis, vi povas kolekti 7 aŭ 9 diversajn florojn dum tuta silentado (grave!), iri hejmen, meti ilin sub la kunsenon kaj endormiĝi. Vi vidos lin en la sonĝo... rakontas la tradicio. Sed nuntempe tiaj ceremonioj estas tute nekredblaj, diras la moderna homo en ni. Tamen povas esti interese vidi se... Sekrete kelkaj knabinoj ankoraŭ kolektas 7 florojn, sekrete ili grimpas trans 7 kradpordoj por fianĉiĝi post 7 semajnoj... La knaboj ŝercas pri tio, ili jam scias ĉion pli bone...

Dumtempe la suno leviĝis. La roso brilas sur la herbo. En distanco ni ankoraŭ aŭdas, kiel sonas la nelacigeblaj violonoj, sed la mistera atmosfero de la nokto foriris. Venas la laceco... kaj melankolio, ĉar devas pasi tiom da tempo ĝis venonta mez-somera festo! La suno brilegas. Sed la homoj ĵus revenis hejmen por dormi...

Kerstin Sällvin



AMSTERDAM

Amsterdam estas la ĉefurbo de Nederlando. La registaro tamen troviĝas en Hago. Ĉi tiu situacio estas iom neregula, sed ĝi estas la rezultato de la evoluo de la historiaj okazintaĵoj. Ion similan oni trovas en la nomo de la lando. Kutime oni parolas pri Holando, kvankam la oficiala nomo estas Nederlando. Nederlando konsistas el 11 provincoj, kiuj origine estis memstaraj regionoj. Du el ili nomiĝas Holando (Norda kaj Suda Holando), kiuj kune formis antaŭ jarcentoj potenca politikan unuon. La dekunu provincoj nun unuiĝis sub la nomo Nederlando. La signifo estas "malalta lando". Ĝi vere kuŝas tre malalte. Se ne estus digoj kaj dunoj du-triona parto estus subakviĝinta. Pro sia malalta stato la lando havas la elfluejojn de grandaj riveroj. Amsterdam troviĝas sur ambaŭj bordoj, ĉe la elfluo en la Suda Maro, de rivero kiu nomiĝas Amstel. Ĉirkaŭ la jaro 1200 fiŝkaptistoj ekloĝis tie. En tiu tempo oni vivis tre primitive. Anstataŭ konstrui ponton oni plenigis la akvon per sablo aŭ tero. Ĉi tian lokon oni nomas "dam". La "dam" en la Amstel ricevis la nomon "Am-

sterdam", kiu nomo poste transformiĝis en "Amsterdam". La "dam" fariĝis la kerno de la urbo. Ĝis hodiaŭ la centra ĉefplaco oficiale nomiĝas "Dam". Sur ĉi tiu ĉefplaco oni konstruis la urbdomon. Ĝis 1800 ĝi tiel funkciis. De 1800 ĝis 1813 la lando estis sub la regno de Francujo. Napoleon sendis sian fraton Ludoviko al Amsterdam kaj dum dektri jaroj Ludoviko regis la landon. Ne troviĝis inda palaco en Amsterdam. Pro tio la urbdomo fariĝis la reĝa palaco. Post la liberigo oni decidis ne plu reŝanĝi ĝian destinon. Ĝi nun servas kiel loko por oficialaj ŝtataj okazaĵoj. Ĉar Nederlando de post 1813 estas regolando la originala urbdomo nun estas reĝa palaco. Kutime tamen la reĝa familio loĝas en alia palaco, ekster Amsterdam, en Soestdijk. Depost sia fondiĝo la urbo rapide ampleksiĝis ambaŭflanke de la Amstel. Ĝi ne etendiĝis en norda direkto ĉar tie estis la golfo de la Suda Maro. Pro tio la urbo akiris la formon de duona disko. Oni konstruis remparon ĉirkaŭ la urbo. Vizitante la urbon oni devis trairi pordegon. La remparoj nun ne plu ekzistas. La nura restaĵo

el tiu periodo estas pordego. Dum longa periodo ĝi servis kiel pesejo, kaj eĉ nun portas tiun nomon. Ĝi nun estas muzeo. Amsterdam kreskis konstante, pro kio ne plu estis loko por enloĝigi la civitanojn. Oni konstruis ĉiam novajn ringojn de domoj ekster la remparoj. La plej ekstera ringo havis remparon, kiu plenumis sian servon ĝis 1850. Ĉe ambaŭ ekstremaj partoj troviĝas ankoraŭ nun la urbopordegoj: la Haarlemmerpoort kaj Muiderpoort. Stacidomo proksime de la Muiderpoort ankaŭ portas tiun nomon. Amsterdam havas havenon, kun la modesta nomo "Y". La Y estas golfo de la Suda Maro. La ŝipoj el kaj al la Norda Maro devis pasi tra la Suda Maro. Kiam la ŝipoj fariĝis pli kaj pli grandaj ili ne plu povis atingi la Nordan Maron laŭ tiu vojo, ĉar la Suda Maro estis ne sufiĉe profunda. Tial oni fosis kanalon kiu iras preter Purmerend kaj Alkmaar al Den Helder. Ankaŭ tiu vojo ne plu taŭgas por ŝipoj nuntempaj. Antaŭ 80 jaroj oni fosis multe pli larĝan kaj profundan kanalon rekte al la Norda Maro, tra



1. Vespera bildo de antikvaj domoj starantaj en la akvo. En la fono la turo de la plej malnova amsterdama preĝejo.
2. La Reĝa Palaco sur la Dam-placo.
3. La turo estas la Okcident-preĝej-turo, proksime de la Anne Frank-Domo.
4. Lumigita fasado de la koncertejo (Concertgebouw).

La kliŝojn afable pruntedonis la eldonisto de De Driekleur, Amsterdam.



p. 13	p. 14
1	2
	3
	4

la dunoj. Ĝia nomo estas "Noordzee-kanaal". La profundo estas 12 metroj. Ĝis hodiaŭ tiu profundece sufiĉis eĉ por la plej granda ŝipo. En la loko kie la kanalo kontaktas la Nordan Maron estas kluzoj. La nivelo de la maro ja ŝanĝiĝas laŭ la tajdo, sed la akvonivelo en la kanalo devas resti konstanta. Kvankam Amsterdam ne troviĝas en tiel favora situacio kiel Rotterdam, kiel havenurbo, multaj ŝipoj venas al Amsterdam, kiu pro la kluzosistemo ne havas la malavantaĝon de la ŝanĝiganta akvonivelo. Grava parto de la komercaĵoj ne restas en Amsterdam. Oni konservas ilin en provizejoj, kiuj funkcias kiel nenieslando. Nederlanda firmo aĉetante varojn por importo devas pagi doganimpостоjn. Sed se temas pri trasendo la varoj povas resti iom da tempo sen impostpago en tiuj provizejoj. Amsterdam do estas grava transito-haveno. Ĝia kontakto kun la Rejno okazas pere de rekta akvo-vojo: la Merwede-kanalo.

La trafiko perŝipa estas multe malpli kara ol alia trafiko. Per ŝipo oni povas atingi Basel en Svislando. Kie ajn vi staru apud la Rejno, estos eĉ ne unu minuto ke vi trovos la riveron sen veturanta ŝipo.


Ankaŭ la enlanda trafiko okazas ofte per ŝipo. Tial ekzistas reto de kanaloj tra la tuta lando. Pro la sama kaŭzo Amsterdam posedas tiom da kanaloj: pli ol sesdek kun pli ol 550 pontoj.

En 1880 oni konstruis la Centran Stacidomon. Ĝi estis tiel granda, ke pro manko de loko en la urbo oni devis fari specialan insulon en la Y. Por rigardi la havenon oni nun devas rondiri la stacidomon.

Apude de la stacidomo, sur la malnova bordo de la Y, troviĝas malgranda turo. De ĉi tiu loko forveturis la velŝipoj por grandaj vojaĝoj. Nuntempe oni povas vojaĝi ĉirkaŭ la mondo en kelkaj tagoj. Antaŭ centjaroj forvojaĝo ofte estis adiaŭo por ĉiam. La turo memorigas tion per sia nomo: la turo de la plorantoj.

Depost 1880 Amsterdam pligrandiĝis en ĉiu direkto kaj perdis sian duondiskan formon. La novaj kvartaloj pli kaj pli similas al la tutmonda arkitekturo, sed la centroparto konservis sian propran sferon, kiun oni ne trovos en kiu ajn alia urbo en la mondo.

H. Bakker (patro)



Internaciaj aspektoj de la manskribo

MAJUSKLO
 UNCIALO
 duonuncialo
 minusklo el la
 9^a ĝis 12^a jar.

Gotika ŝtilo

minusklo uzita
 de la humanistoj

Korespondi estas unu el la ĉefaj aktivecoj de la esperantistaro. Tial estas memkompreneble ke precipe en esperantistaj rondoj la problemo de la manskribo ofte estas temo por priparoli.

Por sia internacia lingvo Zamenhof elektis la latinan alfabeton. Sed ĉiu scias ke rilate la skribmanieron de tiu alfabeto ekzistas multaj laŭnaciaj variaĵoj kaj tradicioj. Pro tio, deĉifrado de la leteroj de niaj eksterlandaj amikoj foje estas temporaba okupo. Maŝinskribon ni ĉi tie ne pritraktu. Oni ja ne estas mezepokulo, asertante ke por kontakto de hom' al homo, de kor' al koro oni nur uzu la individuajn permanajn skribon. Manskribo estas rekta esprimo de la psiko, sed — laŭ eminenta grafologo — ĉiam la rezulto restas certgrade submetita al la jama lerneja ekzemplo.

Se ni klopodas trovi vojon tra la labirinto de la skribmetodologio, la ĥaoso nin ŝokas. En Nederlando ekz. ekzistis pli ol 50 skribmetodoj. Normigo de la literformoj estis urĝa bezono en tiu ĉi lando, kaj fine en 1958 estis publikigita la t.n. Normskribo. Nun paŝon post paŝo, pere de la instruistaj seminarioj kie la estontaj elementlernejaj instruistoj eklernas ĝin, la nova skribo enkondukiga. Ordo venkos ĥaoston.

Cu ne estus eble, iam ankaŭ internacie normigi la latinan skribon? Tiam estus necese ke oni esploru kiuj elementoj jam havas supernacian karakteron, kaj ĉu eble jam ekzistas bona skribsistemo uzata en pluraj landoj.

Samtempe oni pensu pri plibonigo de la skribo. La konsekvencoj de malklara skribo ofte estas tre gravaj. En Usono la rimarkeblaj ekonomiaj malprofitoj kaŭze de neklara skribo estis en 1955 motivo por la fondo de la t.n. Handwriting Foundation (Instituto pri manskribo).


La praktika vivo postulas rapidan kaj facile legeblan skribon. Tamen ankaŭ beleco estas kondiĉo. La postulo pri beleco ne estas nemoderna postulo. Beleco fariĝis unu el la efikaj armiloj de la reklamo. Samkiel korektaj vestoj, nia manskribo servadas kiel nia reklamo, kiel nia prezentado. Ni bezonas skribon, konsistantan el simplaj modeloj. Ornamo de tiuj bazaj formoj estas ebla en kaligrafio, sed ne en ordinara manskribo. La beleco estu eco de la literformo mem.

Tia alfabeto ekzistas, kaj ĝi estas jam aplikata en diversaj landoj. Mi celas la t.n. "italic" (*kursivon*). Ĝi ekevoluis en Anglujo kaj ŝajnas esti akceptita en multaj medioj. La valoron de tiu kursivo agnoskis la nederlanda komisiono kiu devis fiksi normskribon, ĉar ĝi transprenis diversajn litermodelojn. La historio de tiu kursiva literaro

PETU PROSPEKTON PRI



GE I.T.C. - GEB. 114
 SCHIPHOL NEDERLAND



BOVINO BONVINO BONVENO

amase amuziĝu en la i.j.k. en
amsterdam

kongresejo: anne frank-domo

adreso l.k.k.: kastelenstraat 231,
amsterdam

fakte estas la historio de la skribo mem. — Ni povus komenci en malnova Egiptujo. El la egipta ideografio evoluis diversaj alfabetoj. Certe la transiro de ideografio al alfabeto estas interesa temo, sed ni nun lasu ĝin. Ni saltu al la epoko de la Roma Imperio. Jam en la 6-a jarcento a.K. la romanoj kapablis skribi; la alfabeton ili lernis de la grekoj. Admirinda pro sia legebleco kaj harmonieco estas la *romana majusklo*, kiun vi certe konas de enskribaĵoj de antikvaj romanaj konstruaĵoj. Ĝi estas la komenco de la evoluo de la latina skribo. En la 4-a jarcento p.K. kreskis el ĝi la *uncialo*. Multaj kristanaj verkoj el la frua mezepoko estas skribitaj en tiu tipo. Ĝi estas ankoraŭ majusklo; la minusklo poste naskiĝis en la 8-a jarcento.

Apud la puraj kaj belaj literformoj de majusklo kaj uncialo la romanoj ankaŭ konis pli rapidan kursivan skribon por ĉiutaga uzo. Post 500 p.K. evoluiĝis plej diversaj minusklaj literaroj. Ĉie en Eŭropo la majuskla literaro cedis lokon al la minusklaj, ĉar tiuj lastaj estis pli rapide skribeblaj.

Menciinda estas la *karolinga minusklo*, kiu ekestis en la 8-a jarcento (dum la rego de la franka monarĥo Karlo la Granda) kaj kiu baldaŭ forpuŝis la plimulton de la aliaj skribmanieroj. En la 13-a jarcento ekestis nova skrib-

maniero, la *gotika minusklo*. En la arkitekturo samtempe la romanika stilo estis anstataŭata de la gotika. En Italio la gotika stilo tamen neniam enradikiĝis. Oni pristudis la antikvan literaturon, kaj tio kaŭzis la grandiozan renaskiĝon de la klasika arto: la renesancon. Pristudante la antikvajn verkojn la humanistoj estis ravitaj de la puraj literformoj de la manuskriptoj. Erare ili pensis ke tiuj literformoj estas origine antikvaj; ili ne sufiĉe konsciis ke la verkoj, kiujn ili pristudis, ĝenerale estis nur frumezepokaj kopioj.

Ciokaze, oni i.a. retrovis la karolingan minusklon, ĝuis ĝiajn elokventajn formojn kaj redonis al ĝi la unuan lokon. El tiu ĉi "*humanista*" minusklo (tiam uzata en ĉiuj skribejoj de Okcident-Eŭropo, escepte de Germanujo) kreskis ankaŭ porkoresponda formo, la *humanista kursivo*. La minusklo fariĝis nia simpla preslittero; la bela kursivo plue evoluis kiel skriblittero.

Ĉirkaŭ la jaro 1600, pro ornama tendenco, malaperis la sento por harmoniaj skribformoj. La skribado fariĝis speciala arto — esence eĉ

Vertikala skribo ne estis solvo
Normskribo Nederlando
Italic aŭ Italika povas esti konsiderata
kiel elita formo de la Normskribo. 1964

ESTRARO DE T.E.J.O.

Günther Becker, prezidanto, Schlossbergstr. 51, 6653 Blieskastel, Saar, Germanio.
Carlo Minnaja, ĝenerala sekretario, Viale Giulio Cesare 223, Roma 6, Italio.
Simeon Simeonov, vic-prezidanto, G. Genov 22, Sofia-C, Bulgario.
Humphrey Tonkin, redaktoro de "Kontakto" kaj kasisto, 7 Linnaean Street, Cambridge 38, Mass., Usono.
Marek Pietrzak, estrarano pri planado kaj eksteraj kontaktoj, Dworcowa 1, Kluczbork, Pollando.
Ivo Osibov, red. de "La Juna Vivo", Splitskog Odreda 15, Split, Jugoslavio.
Svobodan Zlatnar, estrarano pri kulturaj kaj lernejoj aferoj, Rimska 7, Ljubljana, Jugoslavio.

LANDAJ SEKCIOJ DE T.E.J.O.

AŬSTRALIO:
Daniel Kane, 5/55 Hardwich Street, North Melbourne
BELGIO:
Van Humbeeck, Ridder Dessainlaan 3, Mechelen
BRITIO:
13 Oak Lane, Beccles, Suffolk
BULGARIO:
pk. 587, Sofia
FRANCIO:
34 rue Vauvenargues, Marseille 7
GERMANIO:
Am Festungsgraben 53, 23 Oldenburg
HISPANIO:
Salvador Aragay, Arce 8-2-4, Cornellá, Barcelona
HUNGARIO:
HEA, Petöfi Sándor u. 17, Budapest 5
ITALIO:
Gaspere Bracchi, Via Caimi 54, Sondrio
JAPANIO:
1-13 Motomachi, Bunkyo-ku, Tokio
JUGOSLAVIO:
Terazije 42, Beograd

MADAGASKARO:

176 Route Circulaire, Tananarive
NEDERLANDO:
Kastelenstraat 231, Amsterdam-Z.
NORDAMERIKO:
30 Avenue B, New York 9, N.Y.
POLLANDO:
Dubois 3, Wrocław
SVEDIO:
Lars Olsson, Lilla Fiskaregatan 3, Lund
SVISLANDO:
pk. 33, Lyss/BE
(KOREO: Taekeng Kim, 104-43 An Am-dong, Seong-Puk, Seoul)

LERNEJAJ ABONOJ DE "KONTAKTO"

"Kontakto" estas kutime abonebla kontraŭ 8 guldenoj jare, sed TEJO pretas disponigi la gazeton al lernejoj kontraŭ jarkotizo de nur 2,50 guldenoj (10 steloj).

Tion TEJO faras simple por helpi en la livero de taŭga legmaterialo al lernejoj kiuj lernas Esperanton.

"Kontakto" taŭgas por la pli aĝaj lernantoj (14-jaraj kaj pli) kaj por, ekzemple, anoj de instruistaj seminarioj.

Tiaj abonantoj devas esti lernantoj de Esperanto en oficiala kurso de iu lernejo. Oni devas samtempe pagi minimume 10 abonojn kaj sendi al la administracio de "Kontakto" atestilon sur oficiala skribpapero de la koncerna lernejo, kun informo ke ili estas destinitaj al oficiala Esperanto-klaso en tiu lernejo, kaj kun subskribo de la koncerna respondeca persono. Ni ne povas disponigi ekzemplerojn je ĉi tiu favora prezo al neoficialaj kursoj aŭ nelernejaj klasoj. Ĉiuj ekzempleroj por unu lernejo estos kune ekspeditaj en unu pakajo.

Individuajn numerojn ni povas liveri laŭ samaj kondiĉoj kontraŭ prezo de 3 steloj (0,75 ned. gld.) por unu ekzemplero. Administracio: "Kontakto", UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

la humanista kursivo
: precipe 16^a jarcento

komparebla kun nia moderna abstrakta arto —, sed legeblecon oni ne serĉu en tiu periodo.

Dum la 18-a kaj precipe dum la 19-a jarcentoj ĉie venis multaj novaj lernejoj. La tiamaj instruistoj klopodis imitadi kaj impliki la formojn de la antaŭaj skribartistoj. Ĉiu scias ke la 19-a jarcento ne brilis pro bona gusto. Kaj se ni komparas la majusklojn de la instruisto kun la humanista kursivo, la granda diferenco estas klare videbla. Ili blasfemas kontraŭ ĉiu estetika sento. Ankaŭ rapida skribado restas revo. La vertikala skribo, plurfoje propagandita en la 20-a jarcento, tute ne solvis la problemojn.

Intertempe en Anglujo laboris aliaj fortoj. Jam en la komenco de nia jarcento Edward Johnston instruis novan generacion de kaligrafoj. Inter la du mondmilitoj aktivis movado por la enkonduko de la italika (= kursiva) literaro en la lernejoj. Tiu kursiva alfabeto (italiko) estas bazita sur la humanista kursivo. La plej granda personeco el tiu movado estis la kaligrafo Alfred Fairbank. En Germanujo samdirekte laboris Rudolf Koch kaj en Aŭstrujo Rudolf von Larisch. Multaj personoj ree vidis kian meriton havas bone legebla kaj spirite nobla manskribo.

La propagando por la italiko kelkfoje

ekhavis strangajn formojn pro la tipe angla socia vivo, kiu estas konsekvenco de la natura fenomeno ke oni serĉas samideanojn en batalo por bona ideo. Sed tio ne haltigis la marŝadon de la alfabeto. Nun en diversaj eŭropaj landoj homoj aplikadas ĝin aŭ eklernas ĝin por plibonigi sian "manon". La nederlandaj infanoj kiuj de sia instruisto lernas la normskribon, fakte ankaŭ skribas la italikon. Eble ĉi tiu alfabeto estas la panaceo por la nuna dekadenco de la skribkulturo. Se iam estos enkondukata tut-eŭropa skribo, la italiko havas grandan ŝancon pro sia simileco al la romana majusklo (la ĝenerala fonto), pro sia facila skribebleco kaj pro siaj klaraj kaj ĝustaj formoj.

Interese estas ke la italiko pruntis formojn al kelkaj kursivaj preslitteroj (ekz. *bembo* kaj *centaur*) kaj ke parafrazitaj modeloj de la italiko estas multe aplikataj en kaligrafio, afiŝoj, libro- kaj revuokovriloj. Vidu ekz. la mezon de la kovrilo de Kontakto. Se tiu ĉi surpriza movado marŝos pluen, ni vere povos paroli pri renesanco de la skribo.

Jan Schaap Jr.



Hindujo

La kreskanta industriigo de Hindujo postulas novajn kaj grandajn provizojn da elektra forto. En novaj centraloj, nuntempe konstruataj en la tuta lando, turbinkontrola ekipaĵo de Philips plenumas esencan funkcion por mezuri kaj registri vibradon de lagroj, ekspansion kaj defleksiĝon de la rotorŝafto kaj ekspansion de la maŝinoj dum ekfunkciigo kaj normala turniĝado de la maŝinaro - jen plua kontribuo de Philips al la rapide disvastiĝanta evoluo de Hindujo.


Fido al **PHILIPS** estas tutmonda



Tage kaj nokte oni uzas sennombrajn, plej diversajn produktojn de Philips en la tuta mondo. Inter ili estas: lumigaj ekipaĵoj, radioaparatoj kaj televidiloj, gramofondiskoj, aparatoj por la mastromado, elektraj raziloj, elektrontuboj kaj duonkondukiloj, industriaj kaj sciencaj instrumentoj, telekomunika ekipaĵo, radaro, publikparolaj sistemoj, medicinaj X-radiaj instalaĵoj, kemiaj kaj farmaciaj specialproduktoj.

Germanujo

Radaro de Philips por kontrolo de akvovojoj ebligas al ŝipoj sendanĝeran enhaveniĝon en Hamburgo kaj Bremen. Mikro-ondoj interligas enmarajn staciojn kaj centrajn postenojn.



Anglujo

En la registara laboratorio por atomenergia esploro en Harwell alttensia generatoro 700 kV/8mA de Philips provizas energion al la antaŭinjektilo por la linia protona akcelilo.

